EKO 2022
Esperiga Komuniko
Subtene al la regiona, landa kaj loka agado
UEA · ilei · IF EF
Kunlaborantoj: Rob Moerbeek, Gbeglo Koffi, François Lo Jacomo

**ENHAVO n-ro 4>** ● EKO ● Lidia Z. ● Kroatio ● IKEF ● EU-poŝtkarto ● Liaojiang **< jan. 14**

## EKO tra la tuta 2021 arkivita

La tuta jarkolekto por 2021 nun estas konsultebla en <aktivulo.net> dank' al la bona kunlaboro kun nia redakcia teamo Dima S. kaj Anna S. Serĉu sub <Agadaj raportoj>. Tie vi trovos la komunikojn el 2021 (58 el ili) kaj la kolektojn depost 2013.

## Lidja Zamenhof en la fokuso ĉe UEA


Hodiaŭ la sociaj retoj de UEA alŝutis novan kapbildon, omaĝe al Lidja Zamenhof, kiu forpasis antaŭ 80 jaroj. Vi bonvenas viziti:

- facebook.com/universala.esperanto.asocio
- twitter.com/ueaviva

En 2022 UEA okazigos diversajn agadojn omaĝe al ŝi, la "filino de Esperanto". Kosmopolita virino de nemezureble larĝanima koro, remalkovri pri ŝi faros el ĉiuj ni pli bonajn esperantistojn. Baldaŭ aperos ĝenerala plano pri la afero, sed viaj ideoj kaj kontribuoj ĉiam bonvenas.

Niaj dankoj al Lidja pro ŝiaj historio kaj vivo dediĉita al la mondo kaj al #NiaLingvo Esperanto, kiu en 2022 135-jariĝos.

Fernando Maia Jr., **Universala Esperanto-Asocio |** Vicprezidanto



## Kroata kaj ĉina literaturo – ligita per PEN

Spomenka Štimec estas esperant-lingva verkistino el Kroatio. Ŝi estis sekretariino de la Esperantlingva Verkista Asocio, kiun fondis Tibor Sekeli en Budapeŝto en 1982, kaj ŝi estas nun membro de la Akademio Literatura de Esperanto. La internacia literatura organizaĵo Esperanta PEN konsideras ŝin inter la kvin plej elstaraj verkistoj indaj esti kandidatoj por la Nobel-Premio pri Literaturo. En 2021, por celebri la Zamenhofan Feston, kiu estas tradicie la Tago de la Esperanta libro, la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) proponis simbolan tutmondan legadon de ŝia libro "Hodler en Mostar" (2006). En tiu ĉi unua parto de la intervjuo farita de Alessandra Madella por Ĉina Radio Internacia, ŝi priparolas siajn esploradojn pri la ligoj inter kroata kaj ĉina literaturo. Jen admirinda retejo, akirebla en multaj lingvoj.

http://esperanto.cri.cn/recomended2/3842/20220104/726254.html

## Novjara saluto de IKEF alkroĉita kiel PDF

La prezidanto de IKEF, Ĉielismo Wang Tianyi pretigis novjaran saluton por ilia unua kunveno por 2022. Rimarkinde, ke tra 2021 ili okazigis 46 el tiuj Dimanĉaj Kunvenoj. Du el tiuj servis ankaŭ kiel AMO-seminarioj, AMO 73 en majo 2021 kaj AMO 79 en novembro 2021. Ni celas plian kunlaboron inter IKEF kaj AMO en 2022, eble en septembro.

## Intervjuo kun renoma ruso

La unuan tagon de la jaro Dima Ŝevĉenko intervjuis en Sankt-Peterburgo konatan rusian esperantiston Slavik Ivanov. La intervjuo estas spektebla ĉe jutubo. Bv. "ŝati" la filmeton, disvastigi, aboni la kanalon. Baldaŭ aperostie  ankoraŭ multo interesa en Esperanto.

https://www.youtube.com/watch?v=bf92RLjWuKk

Dima kaj Anna S.

## Poŝtkarta konsciigo por Eŭropo!

Klaus Leith de la Eŭropa Komisiono de UEA pretigis tre bonkvalitajn poŝtkartojn uzeblajn por atentigi eŭropajn parlamentanojn kaj oficulojn pri la propono pri Esperanto farita en la konferenco pri la estonteco de Eŭropo, sed uzeblajn ankaŭ ĝenerale por informi pri Esperanto. Danke al la financa subteno de sennomaj subtenantoj Klaus nun pretas sendi tute senpage:

- ĝis 200 poŝtkartojn al la pli grandaj landaj asocioj en EU (kvanto laŭ ilia volo)
- ĝis 70 poŝtkartojn al la pli malgrandaj landaj asocioj en EU (kvanto laŭ ilia volo)
- ĝis 50 poŝtkartojn al lokaj grupoj / kluboj en EU




Bonvolu rekte peti lin ĉe, kdl@gmx.eu .

## Multlingveco – alvoko por altnivelaj kontribuoj

Normale en EKO ni ne aperigas alilingvajn tekstojn. Jen escepto, la alvoko koncernas nur homojn kun alta nivelo en la angla lingvo.

*Funded PhD opportunity in Language Policy at Ulster University, under my supervision. Project: The instruments of language policy. The project focuses on the comparative study of policy instruments used by governments to manage multilingualism.* Deadline for applications: **28 February 2022**

Michele Gazzola, www.michelegazzola.com

## Liaojiang daŭre aktivas – ĉi-foje per televida elsendo

Dank' al s-ro Liu Weijie, dumviva membro de UEA, la Granda Amuzvespero de Printempa Festo de Liaoning Ekonomiaj kaj Kulturaj Rondoj enkondukos Esperanton, Ni, Liaoning Esperanto-kultura Klubo, kiel unu de la ĉefaj organizantoj, partoprenos la feston. La 9-an de januaro, 2022, per televido kaj retoj 43 milionoj da loĝantoj de la tuta provinco vidos Esperanton, aŭskultos Esperantan saluton de la estraro de Liaoning Esperanto-Kultura klubo al la nova printempo 2022 kaj spektos prezenton de la klubanoj en Esperanto. Sur fonaj muroj kaj granda ekrano aperos nia lingvo kiel sur la foto sube donita.

Wu Guojiang, Prezindanto de Liaoning Esperanto-kultura Klubo, Ĉinio
(中国辽宁世界语文化俱乐部)




## Scienca kalendaro – Hispanio agas manke de ISAE

La Scienca Lerneja kalendaro, pretigita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), kiu, kiel ni anoncis, havas version en Esperanto unuafoje en 2022, jam troviĝas en la reto. Trovu ĝin en la retejo de la CSIC en: https://digital.csic.es/handle/10261/256432

Tie aperas la kalendaro en pdf, en formato A4, en sinsekva ordo. Dua dosiero (A3-folieto, t.e. broŝura formato) entenas la saman enhavon, sed en malsama ordo, por pli facila printado. Dosiero en doc entenas la datrevenojn, en facile legebla formato. Fine, troviĝas Didaktika Gvidilo, kiun instruistoj en la tuta mondo povas utiligi en siaj klasĉambroj, por krei aktivaĵojn, prezenti datrevenojn en facila lingvaĵo, ktp.

Pliaj informoj pri la kalendaro, pri la celoj kaj karakterizaĵoj, troviĝas en la retejo: https://calendario-cientifico-escolar.gitlab.io/epo/final/index.html

Tie (vidu indekson en la maldekstra kolumno) troviĝas ankaŭ ĉiuj datrevenoj en html, por ebla utiligo. La datrevenoj aperas jam de la 1a de januaro en la tvitera konto de la ĝenerala kalendaro https://twitter.com/CalCientifico kun la kradvorto #sciencakalendaro, kaj ankaŭ en la propra konto https://twitter.com/SciKalendaro.

La informo espereble aperos diversloke en amaskomunikiloj. Mi jam trovis ĝin, kun mencio al la esperanta versio, en la ĵurnalo *El Correo*, ĉe: https://www.elcorreo.com/sociedad/calendario-sobresaliente-20220111115230-ntrc.html

Bv elŝuti, diskonigi kaj laŭplaĉe utiligi.

José Antonio del Barrio, Fundación Esperanto, http://www.esperanto.es/fundacion/

## Informlingvoj en du malsufiĉe atentataj gravaj lingvoj

La prezidanto de ILEI, Ahmad Mamduhi,  komunikas pri novaj kursoj.

https://www.espero.ir/eo/esperanto-kurso-araba/ estas filmoj de arablingva prezenteto de Esperanto kune kun kvar unuaj lecionoj de la Rekta Metodo de kara Stano Marĉek. La voĉo estas de arabino, kiu iam lernis Esperanton ĉe mi.
En UEAviva (la jutuba kanalo de UEA) estas filmoj de 2 serioj de instruado de Esperanto per la svahila/sŭahila subaze de libro de kara prof. Nino Vessella: unu fare de li mem, la alia per d-ro Byelongo Elisee Isheloke.

## Printempo aŭroras en Greziljono

PRINTEMPaS: intensivaj kursoj kun Przemek, Szabolcs, Christophe aŭ Marion. Eblo ekzameniĝi de la 22a ĝis la 30a de aprilo 2022. Vidu rete: gresillon.org/p

Aliĝu jam nun por profiti reduktitan prezon por frualiĝintoj. Se la kursaro ne rajtas okazi aŭ se vi ne rajtas veni pro la sansituacio, ni repagos ĉian antaŭpagon. Se vi antaŭpagas per franca banka aŭ feria ĉeko, ni ne enkasigos tiun ĉekon ĝis certas la situacio.

Ĝojajn kaj Sanan Novan Jaron deziras la Esperanto-Kulturdomo en kastelo Greziljono, Francio,
Grésillon – Saint Martin d'Arcé–FR-49150 Baugé en Anjou.

========= vortoj:  920 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝis la **fino de 2021** (per EKO 2021-58). Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro depost 2014.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.